# INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ

Al S-ro Herman Noponen,
Hämeenpuisto 3I B I8
TAMPERE.

183, Woodlands Park Road,
Bournville,
Birmingham,30,Anglujo.

La 23an de Septembro,1956

1/ nombro de membroj
2/ listo de lernejoj kie oni instr. esperanton
3/ Raporto pri iuj faroj aŭ okazoj en la Ligo.

Tre estimata Kolego,

Lastatempe en longa,interesa letero de S-ro Hannes Koivu,mi sciigas,ke vi estas nun la Prezidanto de la Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj,kaj mi volas saluti vin kaj deziras al vi bonan progreson.

Supozeble S-ro Villki restos vian komitatanon ĉe ILEI. Dum ,mi op inias 5 jaroj,via Ligo estas membro de ILEI kaj do rajtas havi komitatanon.Tiu komitatano ricevas ĉiun oficialan komunikajon de ni( malofte ili venas),kaj la ĉefa estas la peto pri statistiko por nia jara raporto. Tio devas enhavi 1/ la nombron de membroj,kaj ankaŭ la 2/ liston de la lernejoj,kie oni instruas Esperanton,se iuj,kaj la 3/ raporton pri iuj faroj aŭ okazoj en la Ligo. Tion ĝis nun sendis al mi S-ro Villki,sed la listo de la lernejoj estas por 1953,ne lastatempe mi ricevis.

Nu,estas por via Ligo aranĝi la sendinton de tiuj novaĵoj,kaj diri al mi al kiu mi sendu la komunikajojn. S-ro Villki ĉiam pagis la kotizon de via Ligo,kelkfoje li pagis tre malavare,kaj tio helpas nin,car komprenebl̦e oni devas havi kason por funkcii!

Mi deziras gratuli la Ligon pri la vasta laboro farita por la projekto "Infanoj de la Mondo". Mi mem havas ekzempleron de la Norda Europa volumo,kaj ĝi enhavas IIO nomojn en la listo de kontribuintoj de Finnlando!Mi korespondas multe kun la redaktora stabo Esperantista,kaj mi bone scias kiom da laboro ili faras. La projekto havas siajn malfortajn punktojn,rilate naciajn kutimojn kaj nomojn,kiujn la japanoj misprezentas,tamen ĝi ja estas mirinde bona projekto.

Mi deziras atentigi viajn membrojn pri la organo de I.L.E.I. "Instruista Letero",kiun eldonas S-ro Oskar Svantesson, Skonertgatan I, Göteborg Vr. Svedujo. Ĝi estas nepre necesa por la aktivaj geinstruistoj kaj edukistoj,car ĝi komunikas la detalojn de niaj faroj,havas artikoletojn,kaj informojn ,kiuj helpas al nia solidareco,kiel instruista komunumo. Ĝi kostas 4 sv.kr. por IO numeroj,kiuj komenciĝas je la unua ricevita. Supozeble estas facile sendi monon al S-ro Svantesson,svedan monon,aŭ postmandaton. Ju pli da personoj abonas,des pli sukcese estos nia laboro.Mi ofte notas la nombron de instruistoj en la UEA Jarlibro,kiuj estas en Finnlando. Car sajne vi ne havas vian propran bultenon,kiu povas kunligi vin,des pli grave estas ricevi la internacian bultenon "Instruista Letero"n

Ĉe ni,en Britujo,estas bulteno instruista,kiun mi mem redaktas. Mi sendas al vi specimenon. Ĝi eldoniĝas trifoje jare,kaj enhavas kaj naciajn kaj internaciajn novaĵojn. Komprenebl̦e ankaŭ pluraj membroj abonas "Instruista Letero"-n.Ni havas tre fidindan membron kiu kolektas tiujn abonojn kaj sendas al Svedujo,car li havas rektan rilaton kun Svedujo kaj povas.

Supozeble vi scias pri la infanrondoj,"Grajnoj en Vento" per kiuj lernejanoj kontribuas siajn verketojn,aŭ desegnaĵojn kaj faras rondojn kun aliaj en aliaj landoj.La adreso estas Marcel Erbetta,

Pri pagmaniero:-

Por pagi bazan kotizon al ILEI,vi povas sendi la sumon, la egalon de £ 6 anglaj ŝilingoj,kun,se eble,iom pli,per internacia postmandato.Tio,mi aŭdas,estas la plej simpla maniero.Vi povas sendi tion al mi mem persone.

Aŭ vi povas sendi per internaciaj respondkuponoj,kiuj estas multkosta metodo.Ĉiu respondkupono valoras 6 pencojn ĉe ni,do vi devus sendi I2 kuponojn almenaŭ.

Por pagi "Instruista Letero",kiu kostas 4 svedajn kronojn por serio da IO numeroj,vi devas sendi la sumon al S-ro Oskar Svantesson.Li ankaŭ preferas postmandaton.Supozeble ne estas malfacile sendi monon al Svedujo?

La adreso de li estas :- Skonertgatan 1,Göteborg Vr.

Kompreneble ni esperas,ke ankaŭ aliaj membroj abonos I.L. ĉar ĝi enhavas multe da gravaj kaj interesaj informoj.

Mi volonte ricevos iajn informojn pri lernejoj,kie oni instruas Esperanto,kun precipe tiuj,kiuj volas internacie korespondadi. Mi konstruas liston de la instruistoj kaj lernejoj korespondemaj,por ke mi kunligu laŭ bezono kaj taŭgeco tiujn,kiuj postulas.

Mi ricevis la nomojn de kelkaj de S-ro Vilkki en,mi opinias ,la jaro,I953.De tiu tempo mi ne havas informojn,krom pri la lernejo de S-ro Vilkki mem.

Ĉu mi informis vin sufiĉe multe? Se,ne mi kun plezuro respondos.

Bona novaĵo estas,ke vi intencas ĉeesti la sekvontan Kongreson. Vi tiam konatiĝos kun multaj el ni!

Ni celas grandan instruistan kommunumon,ĉar la kunlaborado inter la geinstruistoj per Esperanto kaj la praktika uzado de la lingvo en nia profesio estas unu el la plej bonaj rimedoj disvastigi la influon kaj potencon de nia lingvo.

Mi enmetas parton de nia lasta bulteno de S.B.E.T.por ke vi legu,se vi ankoraŭ ne havis la okazon la raporton,kiun mi,kiel Sekretariino de SBET faris por niaj membroj.

Kun multaj bondeziroj,

Mi restas,via sincera kunlaboranto,
Violet C. Nixon
Violet C Nixon

# INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ

183, Woodlands Park Road,
Bournville,
Birmingham,30
Anglujo.

Centra Oficejo.

La 20an de Januaro,1957

Karaj Kolegoj,

Koran novjaran saluton al vi ĉiuj!
Mi skribas frue en la jaro,car ec nun estas bone pensi pri venontaj kunvenoj en propraj landoj kaj en Marseille.

Jam nia brita membro-asocio,S.B.E.T. okazigis sian Jaran Konferencon,la 28-29an de Decembro,1956. El niaj 191 membroj,17 partoprenis la aferkunvenon,sed ni ankau okazigos kunvenon ce la Brita Kongreso dum Pasko. Kvankam kompreneble ni ne estas kontentaj pri nia ceestantaro nombre,tre viglaj kaj interesaj estis la kunvenoj. Ni havis raporton kaj diskuton pri lernejaj ferioj;pritraktis nian jaragadon,kun aparta atento al nia "Esperanto Vocabulary",eldonita en Oktobro; kaj inter aliaj aferoj auskultis paroladon de unu membro pri spertoj en Usona Lernejo. El niaj membroj 20 instruas lernejan kursojn au postlernejajn rondojn,18 gvidas vesperajn kursojn au rondetojn,23 faris paroladojn propagandajn,verkis artikolojn,k.t.p. Tiujn detalojn la Sekretario kolektas dum la jaro. ĈIU MEMBRO estas informita pri naciaj kaj internaciaj aferoj,pere de nia bulteno,trifoje jare.Nia kotizo estas minimume 2s 6p. Inter niaj membroj estas S.A.T. anoj.Ne ciuj instruistoj Esperantistaj aligis al ni,ec kelkaj,kiuj instruas lernejajn klasojn. Kial mi ne scias,eble car ili preferas labori individue. La B.E.A.(Brita Esperanto-Asocio) helpas nin, presigante niajn raportojn kaj anoncojn.

Nu,vi diros,kial skribi al ni pri S.B.E.T? JEN KIAL. Ni multe en la Centra Oficejo sentas la mankon de aktualaj informoj el kelkaj landoj,kiujn ni povus utiligi reciproke pere de "Instruista Letero",kaj por respondi individuajn petojn. Internacia agado inter instruistoj estas la bazo sur kiu ni progresas,kaj per kiu ni konvinkos la eksteran mondon pri la valoro kaj efikeco de la lingvo.

Jen,do, kelkaj punktoj pripensindaj:-

1) Ĉu vi ankau kunligas geinstruistojn per kunveneto,per bulteno,kaj havas scion pri la lernejoj,kie oni instruas,pri la agado de geinstruistoj?

2) La "Esperanto Vocabulary" de S.B.E.T. jam ricevis multan laudon,kaj povus esti la bazo por internacia lerneja uzado kaj verkado. Ĉu estas la espero ce vi adapti gin por nacia uzado? Certe granda tasko.

3) Ĉu vi povas proponi,ec NUN,taŭgajn erojn por niaj instruistaj kunvenoj en Marseille,kaj personojn,kiuj povus pritrakti tiujn.

4) Dum Pentekosto okazos la naciaj Jaraj Kongresoj en kelkaj

landoj,do,ne estas eble pli frue sendi bezonatajn inform-
1 ojn al la Centra Oficejo pri a) nombro da membroj instruistaj
2 b) listo de lernejoj,kie oni instruas Esperanton,se iuj
3 c) nomo de reprezentanto via ce la Komitatkunsido de I.L.E.I.
4 en Marseille. Do,la daton,la 15an de Junio,mi proponas al vi
por ricevi informojn,pli frue se eble.

Neniuj sensaciaj alvokoj kaj frapaĵoj povas anstataŭi la kvietan,daŭran laboron de la geinstruistoj,kiuj verbas inter la kolegoj,instruas al ec kelkaj lernantoj,kaj tre grave, pliboniĝas sian propran scion pri la mondo pere de Esperanto.

Ĉiam la Centra Oficejo deziras servi al la gekolegoj,kaj dedicas multe da tempo al ciuspeca agado.

Kelkaj organizitaj grupoj ĝis nun ne oficiale aliĝis al ni, kaj ni esperas,ke tio estos eble,car tio donas pli da membroj al ni kaj pli da solidareco. Ni ĝojus audi de vi pri tiu punkto.

Du,tri komitatanoj opinias,ke ni konsideru ĉiun,kiu abonas "Instruista Letero"n,kiel individuan membron de I.L.E.I. sen plua pago,kaj pri tiu punkto ankaŭ ni deziras havi vian opinion.

Por la Pedagogia Diskutado de I.L.E.I. en Marseille ĝis nun venis 3 proponoj:-

I) Kian rolon la privataj lernejoj ludas en la edukado.

2) Kiuj estas la limoj de la devoj de instruisto?

3) Parolado pri la eduka sistemo en Francujo.

Ĉu vi preferas iun el tiuj,aŭ ĉu vi havas alian? La temo estu pedagogia lau generala senco,ne pri Esperanto,kiun ni pritraktas en nia aferkunveno.

Se vi konas iun kolegon,kiu ĉeestos niajn kunvenojn en Marseille,kaj kiu povus enkonduki aŭ partopreni tian pedagogian diskutadon,tre volonte ni ricevos ties nomon kaj adreson.

Kun plej korajn bondezirojn,

Sincere via,

Violet C. Nixon

Sekretariino de I.L.E.I.

Violet C Nixon

# INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ

Centra Oficejo.

183, Woodlands Park Road,
Bournville,
Birmingham,30
Anglujo.

La 3Ian de Aŭgusto,I957

Al S-ro H. Noponen,
Hämeenpuisto 3I B I8,Tampere.
Finnlando.

Estimata Samideano,

Mi skribas por demandi vin ĉu ankoraŭ Finnlanda Instruista Asocio deziras esti membro-asocio de nia Ligo?

Baldaŭ mi devas sendi la detalojn pri niaj membro-asocioj,kaj iliaj reprezentantoj,kiuj estas sekve niaj komitatanoj al U.E.A. por enmeti en la Jarlibro.

Mi ne ricevis iajn informojn de post letero de S-ro Koivu I7-9/ I956,kiam li diris,ke en Tampere nun estas la centro de la instruista asocio.

Du,tri foje mi jam skribis,sed ne havis respondon aŭ de vi mem aŭ de S-ro Vilkki,kiu kutime pagas la kotizon de la asocio al I.L.E.I.

Mi treege bedaŭros,se vi ne plu povas esti membro-asocio.

Dum la Komitata Kunveno de ILEI en Marseille,estis decid-ite plialtiĝi la bazan minimuman pagon de membro-asocio ĝis 6 anglaj ŝilingoj,kun rekomendo al krompago por la funkciado de ILEI. Krome oni decidis daŭrigi "Instruista Letero"n,kiel la oficialan organon de ILEI kaj ĉiu reprezentanto devus tiun aboni.La kosto de ĝi estas 4 svedajn kronojn,de S-ro Oskar Svantesson,Skonertgatan I, Göteborg,Svedujo.

Estas eble,mi opinias,fari pagojn pere de internacia poŝtmandato de la poŝtoficejo,aŭ pere de banko.

Ĉi tiuj malgrandaj sumoj donas multe da ĝeno al ni ĉiuj, bedaŭrinde,kaj pro tio estas pli facile,kiam venas okazo pagi ĉe Kongreso,aŭ eĉ por pli ol unu jaro por eviti oftan pagon.

Sendube interesos vin sciiĝi,ke unu kolego el Finnlando ĉeestis la publikan aferkunvenon de ILEI en Marseille. Li estas Svante Kivinen el Pori. Mi esperas,ke li trovis la kunvenon interesa.

Mi sendas al vi korajn salutojn,kaj mi estos danka se vi baldau povas informi min definitive pri la intenco de la Instruista Asocio Finnlanda.

Via sincere,

Violet C. Nixon

Violet C Nixon

P.S. La Komitato de ILEI ankaŭ decidis,ke en landoj,kie ne estas membro-asocio,povas esti individuaj membroj de ILEI per simpla abono al "Instruista Letero".

La kopiaĵo pri la letero, sendita al Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj 15/11-57

Estim S:ino Violet C.Nizon, Anglujo

Unue mi devas peti pardonon, ĉar tro malfrue mi respondas pro viaj leteroj alvenintaj dum ĉi tiu jaro.-Dum antaŭaj jaroj la estraro de Esp.Ligo Finnl.Instruistoj estis en Helsinki-urbo, kaj unujare jam inter ni ĉi tieaj esp.instruistoj.Ni eĉ ĝis nun ne sciis, kion ni devus fari.-Iam mi letere petis helpajn vortojn de la samid.Joel Vilkki, kiu loĝas en Somero-paroĥo kaj antaŭ agis kiel nia Esp.estro.Li ne eĉ respondis mian leteron.-Nun mi petas konsilojn de vi.-

Certe ni deziros daŭrigi nian membrecon en Internacia Ligo de Esp.Instruistoj.Nune mi ne scias, kiel ni povos pagi la kotizon. Kiom ni ŝuldas al I.L.E.I ? Espereble vi ree skribos kaj donos al mi la konsilojn. La samideanon Svante Kivinen mi konas.Li l loĝas kaj laboras en Pori-urbo. Mi intencos partopreni sekvontan Esp kongreson, sed eble antaŭ jam devus pagi nian ŝuldon.-

Tutkore salutante via

Herman Noponen,
Hämeenpuisto 31.B.18.
Tampere.

# INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ

La 2Ian de Novembro,I957

Centra Oficejo de ILEI,
I83, Woodlands Park Road,
Bournville,
Birmingham,30
Anglujo.

Al S-ro Herman Noponen,
Hämeenpuisto 3I.B. I8

Estimata Kolego,

Kun vera plezuro mi aŭdis de vi,ĉar mi ja devis supozi,ke la Instruista Ligo de Finnlando malaperis!

Mi ankaŭ skribis al S-ro Vilkki,ĉar dum pluraj jaroj li funkciis,kiel la reprezentanto de la Finna Ligo Instruista.Sed fine li ne respondis. Li dum du,tri jaroj diris,ke li estas tro multe okupata.

De S-ro Koivu,mi aŭdis,en I956,ke vi estas la Prezidanto,sed ke verŝajne ne estas Sekretario. Pro tio mi skribis al vi.

Nun,mi sendas al vi kopion de nia Regularo,kun malgrandaj ŝanĝoj.

Vi vidos,ke la nacia instruista societo aranĝas sian funkciadon tute laŭvole kaj,en multaj landoj, oni havas diversajn metodojn. Ĉe ni en Britujo,ni petas malgrandan jaran kotizon,por ke la membroj ankaŭ sentas sin ne en embaraso pri tro da kotizoj.Ni nomas minimuman kotizon,kaj almenaŭ duono de niaj membroj donacas pluan sumeton. Ni kunvenas unufojon ĉiujare en Londono.Ni elektas malgrandan komitaton por gvidi aferojn intertempe. La membroj kutime loĝas apud Londono por ebligi al ili ĉeesti la komitatajn kunvenojn 4-foje dum la jaro. Estas esence,ke tiuj sufiĉe apude loĝas,ĉu ne? Ni eldonas bultenon trifoje jare,kiun ĉiu membro ricevas,kun informoj.Tio estas nia baza laboro.Kompreneble ni faras nian eblon diversmaniere influi la edukan mondon.Ni ankaŭ eldonis du lernolibrojn,unu legolibron,kaj lastatempe vortliston por lernejoj,por ke ili havu simplan liston por korespondi kaj verki.

Nun por turni nin al ILEI. Vi vidos,ke ĉiu membro-asocio devas pagi la bazan kotizon,6 anglajn ŝilingojn,al mi la kasisto. Antaŭe S-ro Vilkki pagis kelkfoje ĉe Universala Kongreso,alifoje pere de U.E.A. ĉar li estas ĉefdelegito,ĉu ne? Por la nuna jaro,I957-58,neniu pagis. Estas necese ankaŭ,ke vi nomu reprezentanton ĉe ILEI. Antaŭe tiu estis S-ro Vilkki.Ĉu vi mem bonvole agos de nun? Almenaŭ provizore ĝis membroj havos la okazon elekti? Vi estas la Prezidanto ĉu ne,do tre taŭga persono.La reprezentanto devas aboni nian oficialan organon,"Instruista Letero"n.

Rue des Pins 66,Bienne-Biel 7,Svislando.

Se vi havas adresojn de lernejoj,kiuj volas interkorespondadi au ~~per de~~ grupe au individue,kaj sendos al mi la adresojn,mi transdonos ilin al nia Lerneja Koresponda Centro ĉe Fraŭlino Tegg. Ŝi baldaŭ translogiĝos,do mi ne sendas ŝian adreson. Oni devas sendi respondkuponon por ĉiu lernejo,kaj indiki ĉu la adreso estas daŭra,au nur dum definitiva tempo,car kelkaj lernejoj ĉiam instruas,kaj kelkaj nur dum unu jaro.Aĝo kaj grado de lernado ankau estas necesaj.

Mi bone scias,ke por havigi rapidan respondon,estas konsilinde anonci sin en internacia gazeto,sed ni deziras interligi tiujn lernejojn,kiuj daŭre instruas kaj bezonas korespondantojn.

S-ro Koivu bedaŭras la malgrandon de via membraro,sed,estimata kolego,mi opinias laŭ sperto longa,ke daŭra kaj fidinda laboro inter malgranda nombro estas tre altvalora,kaj estas ~~////~~ kvazaŭa nukleo.

Ni en Britujo havas preskaŭ la samajn malfacilaĵojn,kiel vi,mi opinias,sed ni ĉiam klopodas,kaj ĉiun jaron ni havas nian jarkunvenon,kaj nian paskan lernejon.Ni estas centro por informoj pri instruado de Esperanto,k.t.p.

Mi enmetas la bultenon de nia societo por Junio. Sekvos baldaŭ nia oktobra bulteno kun novaĵoj pri la internaciaj kunvenoj,k.t.p Espereble vi ankaŭ ricevos tiujn de viaj samlandanoj.

Kore mi salutas vin,kaj ankaŭ per vi ĉiujn geinstruistojn Esperantistajn.

Via sincere,

Violet C. Nixon

Violet C Nixon.